GISTO,MAJ,2007.

G.O.Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo.

$$$

preferas la latinon anstataù la 100% regulan kaj facilan Esperanto.

TESTO – Kiu plej gxuste esperantigos la infran frazon, meritas laùrojn de diligentulo:>>> Já que a preguiça rege a cabeça de muitos esperantistas gaúchos, nunca acabará de haver principiantes durante toda uma geração.

GAJA HAVENO

Gisto salutas la revenon de Gaja Haveno, Aprile/07. Brave, instr. Cezar! Chiu legajxo bonvenas en la gaùcha komunumo. Manke de pli oftaj renkontigxoj indas je aplaùdoj lia laboro. Kvazaù diamantfosisto li eltrovas erojn malfacile troveblajn de nur jxurnala leganto. Aliflanke, li proponas la richigon de enkapa vortaro per vortoj malofte uzataj en chiutagaj babiladoj...ech opotunajn neologismojn li provas enkonduki: “fano”, eble inspirata de la itala lingvo. Longan vivon al G-Haveno!

TASKO

Tre plachus ekscii, kiu estis la plej timiga evento en via vivo, pro akcidento, grava malsano aù alia kialo, kiam kie kaj, se vi volas, menciu la motivon (pro kulpo via aù de alia persono) de la dangxero kiu minacis vin. Bv skize surpaperigi la zorgon kiu vin afliktis, kiel vi sukcesis eldangxerigi sin kaj BV aldoni se vi konsentas ke via teksto estos aperigita en Gisto, chu vi volas ricevi prikomentojn, , private aù chu publikigite en Gisto.

VIZITO?

Samideano Lusjo dum antaùlasta VK kontentigis min per la promeso veturi mian urbon en baldaù venontaj tagoj. Tio ne okazis. Li ankaù ne vidigis sin dum la pasinta kunsido. Mi scivolas, kio koboldo malhelpis lin veturi al Kaiurbo. Chu iu scias informi?

CHU KAIURBO HANTATA?

Pluraj samideanoj jam anoncis viziton al mia urbeto, pokaj vere povis plenumi la promeson. Chu ili domagxas la elspezon por la busbileto? Mi rekonfirmas ke bufedoj ne mankas kaj ke mi garantias: la plezuro pasigi tagon kun unu aù du samideanoj valoras por mi pli ol la tagmangxo. Chefe bonvenos homo kiu instruos al mi uzi la internetan SKAJPO-sistemon. Do, se libertempon vi havas, venu babili, por oleumi la langon kaj tiel iam altnivele reprezenti la Gaùcholandon dum E-evento en alia sxtato.

Bonhumoro.

RUZA KNABETO (DG)

Jochjo esperoplena demandas al sia panjo: okaze de mia naskigxotago, kion mi ricevos donace?
- Sed, fileto mia, mankas ankoraù longega tempo gxis venos la tago.
Jochjo paùtas petole kaj diras: gxuste pro tio. Mi volas antaùscii chu valoras la penon bonkonduti gxis tiam!

CHE DENTISTO

Demandite pri la motivo kiu kaùzas la malbonodoran elspirajxon de homoj, la dentisto respondas: mi ne certas pri la nura, vera kaùzanto sed gxi povas okazi pro la viskio.
– Ne gravas, doktoro. Pli poste, kiam vi estos sobra, mi revenos

.....

Dentkuracisto esploras la dentaron de juna ino kaj verdiktas: necesas nepre eltiri chi denton. – Eltiri denton?...! hoh ne, tute ne! Mi preferas naski bebon ol suferi denteltiron – Do decidigxu tuj, kara fraùlino, por ke mi gxustigu la kusxsegxon al adekvata nivelo...